

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFONTA ★

Publikigilo de multaj gravaj esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolscienca).

Protektantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa  
W. M. Page, advok., Edinburgh  
Ernest Archdeacon, Paris  
J. Gilli Nort, komercisto,  
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,  
București  
Frans Schoofs, Antwerpen  
P. v. Medem, bank- kaj fabrik-  
direktoro, Kaunas.

N-o 184  
23. 3. 1924

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.  
Redaktoro: Robert Kreuz.  
Redakciaj kunlaborantoj:  
H. Jung kaj M. Butin, L. K.

Administracio:

Horrem b. Köln, Germanlando

Abonprezo

po numero egalvaloro de 0,06 dolaro  
aŭ 0,30 sv. fk. por landoj, kies valuto  
suficis maksimume 50%; por ĉiuj aliaj  
landoj 0,05 dol. aŭ 0,25 sv. fk.

Anonprezo

po kvadrat-centimetro egalvaloro de  
0,20 sv. fk. (ĉe antaŭa pago 0,15 sv. fk.)  
en „Internacia Komercio“ la duoblo.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

## Esperanto enkondukita en la Policoficira Lernejo en Bukurești.

Transatlanta Radio-parolado en Esperanto de New York (vidu sur paĝo 3).

En ET 185 ni jam koncize raportis pri gratulinda sukceso de niaj rumanaĵoj. Ni publikigas hodiaŭ raporton de konata rumana gvidanto esperantista s-o Ce, aldonante tradukon de la ekzamena protokolo.

La suprecitita lernejo, nomata ankaŭ Scienca Lernejo Polica, estas la preparado de la rumana policoficiraro kaj ĝin devas trapasi ĉiu kandidato en trimonata kurso.

La lasta serio de lernantoj, kies kurso komenciĝis en la aŭtuno pasintjara, havis deksep lernantojn el 17 diversaj urboj. Je la propono de s-o H. Fischer, vicprez. de Rum. Esp. Soc., la gvidantaro de la lernejo enprogramigis ankaŭ Esperanton, kiel eksperimentan kursobjekton. La ekzamenon, kiu okazis la 24 febr., prezidis s-o Romulus Voinescu, direktoro ĝenerala de la Rumana Polico. S-o R. Voinescu, kiu estas la direktoro de la lernejo, estis tre bone impresita de la parola facileco pruvita per la frapaj respondoj de la kandidatoj. Tre kontenta pri tiu rezulto, s-o direktoro direktis gravan paroladon al la lernantoj, deklarante, ke li donos ordonon por la konstantigo de Esp. kiel deviga lernobjekto en la lernejo per profesoro ŝtate salajrata. Li disponis, ke la kursa libro, eldonota pri la lernejaĵoj, enhavu ankaŭ Esp.-gramatikon kaj la policistan terminaron. Je speciala dispono de la s-o direktoro pri Esperanto estis farataj mencioj en la ekzamena protokolo, en la diplomoj kaj en la atesto.

Des pli gravan signifon havas la ordono pri oficiala enkonduko de Esp., ĉar ĝi estas la sola lingva objekto en la Polica Lernejo Scienca.

La klera persono de s-o Romulus Voinescu, kiu pro siaj kapabloj, kiel eminenta membro de la juĝista korporacio rumana, estis elektita je la grava posteno de la polica ĉefdirektoro, donas al ni garantian, ke la alprenon de Esperanto en la Polica Lernejo baldaŭ sekvos la oficialigo de Esp. ankaŭ sur aliaj policaj kampoj. A. Ĉe.

(Traduko laŭ la rumana originalo).

### Protokolo.

Hodiaŭ, 24. febr. 1924.

Ni, Profesoroj de la Polica Lernejo Scienca, kunvenintaj en Konsilio la 24-an tagon de febr. 1924, ekzamenis la 17 lernantojn frekventintajn la kursojn de la lernejo pri la lernobjektoj laŭ programaj, nome:

konsultacia juro, kriminala juro, administra juro, praktika polico, juĝeja medicino, parola portreto, lingvo Esperanto kaj kemia kurso.

Fininte la ekzamenadon, la Profesora Konsilantaro decidis doni diplomojn kaj atestojn pri absolvo al la subnotitaj lernintoj... (sekvas la nomoj de l' absolvintaj komisaroj kaj agentoj, el kiuj diplomojn ricevis 12, atestojn 4, kaj 1 malsukcesis).

Pri kio ni faris la jenan protokolon en du ekzempleroj, el kiuj la unua estos sendata al la „Direkcio de l' Polico kaj Ĝenerala Ŝtata Sekureco“ kaj la dua estos konservata en la arkivo de la Lernejo.

Subskr. Romulus Voinescu, ĝen. dir., direktoro de la lernejo; Emanoil Stan, ĝen. inspektoro; C. Smântănescu, ĝen. inspektoro; Dr. N. Stoeneanu, juĝeja kuracisto; Dr. I. I. Radulescu, kemiisto, Tiberiu Morariu, Prof. de Esperanto.

Por la konformeco:  
Sokr. C. Florescu.

Sigelo.



S-o Romulus Voinescu,  
ĝenerala direktoro de la Rumana Polico kaj Ŝtata Sekureco.

## X. Internaciaj Floraj Ludoj en Barcelona.

Por tiu ĉi literatura konkurso estas ricevitaj ĝis fino de februaro 15 verkoj kun la jenaj devizoj:

1. Ĝoja momento.
2. Vixit.
3. Manĝemulo.
4. Legendo bela.
5. Rozoj, amo, pio: Bela harmonio!
6. Iam jam premiita.
7. Aŭburno.
8. Kantu kore, ĝojsonore.
9. En blua silenta nokto.
10. Antaŭen al la bon! Antaŭen al la bel!
11. Ad Augusta per Angusta.
12. Bataladu, sed por paco kaj amo!
13. La steloj ne bruas.
14. Nur mortinte mi ĉesu flegadi mian ĝardenon!
15. Kulfimo estas dua naturo.

Tiuj unuaj 15 konkursoj venis el 6 landoj: Anglujo 7, Francujo 3, Germanujo 2, Polujo 1, Rusujo 1, Katalunujo 1.

La manuskriptoj devas esti ricevitaj antaŭ la 15 aprilo de la sekretario de la Floraj Ludoj, s-o Jaume Grau Casas, Claris 72, Barcelona (Katalunujo).

La 24 premioj de la konkurso konsistas el libroj, artobjektoj kaj 825 pesetoj entute. Petu informojn! La festo okazos dum la XI-a Kongreso de Kataluna Esperantista Federacio, Vich 8-10 junio.

### Naŭa katolika Esperanto-kongreso en Wien.

Unua bulteno.

Jam kelkaj gazetoj de nia gazetaro raportis pri la okazo de nia „Naŭa“ en Wien (ĉefurbo de Aŭstrio), laŭ decido de nia „Oka“ en Nürnberg.

La Loka Organiza Komitato (L. O. K.) por la Naŭa Katolika Esperanto-Kongreso en Wien invitas ĉiujn katolikajn gefratojn de la tuta mondo, partopreni al la granda festo, okazonta de la 6—9 aŭgusto 1924 antaŭ la „Deksesa“. Ĉio

estos bone preparata, kaj la granda ĉarma ĉefurbo de Aŭstrio prezentos multajn vidindaĵojn al la ĉeestantoj. Ni esperas ke ĉiu samideano, kiu ĉeestis nian „Okan“ en Nürnberg, ankaŭ kun ĝojo veturos al Wien. Ĉiu kongresinto varbu unu partoprenonton por nia „Naŭa“. Per tio li pligrandigos nian movadon kaj helpas pli frue efektiviĝi nian celon.

La aliĝiloj por „nia kongreso“ estas forsenditaj. Ni sciigas, ke ni uzas la kongreskarton de la „Deksesa“, sed kiu volas partopreni je nia „Naŭa“ devas aliĝi al nia kongreso per aparta aliĝilo. Kotizo por nia Naŭa ne estas postulata.

Do ĉiu partoprenonto aliĝu kaj pagu la kotizon al la „Deksesa“. Sed por aranĝi, organizaj laboroj estas nepre necese ke ĉiu sendu al ni legeble skribitan aliĝilon. Kiu ne jam ricevis apartan aliĝilon skribu tuj al la adreso: S-o Viktoro Kasmader, sekr. de L. O. K., Herbeckstr. 92, 6. Wien 18. 2.

Plenigitajn aliĝilojn sendu al la sama adreso de L. O. K. Sciigu al ni, ĉu vi deziras nur apartan aliĝilon, aŭ ankaŭ tiun de la Dekseso. Laŭ necese ni alsendos ambaŭ.

Ĉiuj demandoj, informoj estu sendataj al la ĉi-supre indikita adreso de L. O. K.

Bonvenon en Wien!  
por la L. A. K.  
Kasmader.

## Socia Vivo.

### Internacia Konferenco de Vilaĝanoj.

Interesajn detalojn enhavas detala raporto pri speciala konferenco okazinta lastan oktobron en la koro de Rusujo en Moskva.

Reprezentantoj de vilaĝano de ĉiuj nacioj, loĝantaj en Unuiĝo de l' Sovet-Respublikoj, en esinta cara palaco en Kreml etendis fratan manon al reprezentantoj de l' vilaĝanoj de 40 eksterlandaj regnoj. Je la unua fojo en la historio okazis la Unua Internacia Konferenco de Vilaĝanoj, je la unua fojo en historio estas fondiĝa fundamento de l' tutmonda unuiĝo kamparana!

„Miaj okuloj ne kapablas ĉion samtempe percepti“ — diras unu konferencano: „Jen preriferis juna norvega vilaĝano en verda kamizolo kun „argenta“ butonoj kaj ruĝa bordero; jen estas reprezentanto de l' burjataj vilaĝanoj en bruna silka ĥalato; kaj jen estas Jufuz-Mahometo el Dagestano kun ponardo sub la zono, en burko kaj „papaho“ (nacia ĉapo); jen estas samojedo, jen estas ukraina vilaĝanino en ĉemizo brodita, vilaĝanoj en kiletoj; francoj, germanoj, hungaroj, bohemoj, amerikanoj, — kia diverseco de vestoj, gentoj, dialektoj!“

La konferenco daŭris 6 tagojn, kaj fundamenta demando estis parolado de l' franca delegito pri: „Garantiaĵo de l' paco kaj batalo kontraŭ milito“, kaj fundamenta decido estis fondo de l' nova organizacio: Internacia Vilaĝana Soveto (komitato), kies nuna estado estos en Moskva, kaj kies ĉefaj taskoj estas: 1. defendo de l' tutmondvilaĝanara profito kaj plibonigo de termastrumado; 2. unuiĝo vilaĝanara kun laboristoj por komuna batalo!“

Estas elektitaj en I. V. K. reprezentantoj de sekvantaj landoj: Ukrainio, Buriat-Mongolio, Tataro kaj Jakuta respublikoj; Ĉuvaŝa, Maria kaj Voja regionoj, Turkestano, Kaŭkazo, Malantaŭkaŭkazo, Baŝkirio, Kirgizio, Blankrusujo, Bulgarujo, Francujo, Usono, Latvio, Finlando, Estonio, Japanujo, Indo-Hinjuo, Brazilio, Germanujo, Meksiko, Polujo, Litovio, Ĉeĥoslovakio. En prezidantaron estas



elektitaj k-ol: Smirnov (Rusujo), Dombal (Polujo), Vuazle (Francujo), Grin (Ameriko), Aj-Kavak (Indo-Hinujo), Hajasi (Japanujo), Birsch (Germanujo), Ridlo (Ĉeĥoslovakio), Gorov (Bulgario), Herro (Skandinavio), Halvan (Meksiko).  
Arsenij Avdeev, Kazan.

**Scienco.**  
**Astronomio.**

**La enigmo de la poluslumo solvita.**  
La norvega profesoro Lars Vegard scigias, ke li sukcesis solvi la enigmon de la poluslumo. Li trovis, ke la plej supraj aertavoloj konsistas el firmaj kristaligitaj azoteroj — la tero do estas enfermita en baloni!

La supozo pri tiu ĉi tavolo de firmaj azoteroj, kiuj estas tenataj ŝveblantaj kaŭze de sia elektra ŝarĝo, ŝajnas doni la klarigon de longa vico da neklarigitaj fenomenoj kaj samtempe renversigi multajn malnovajn teoriojn.

La profesoro studadis en Kristiania, Nederlando kaj en la geofizika instituto en Tromsø, kie la observado plue okazas.

Per tiu ĉi nova malkaŝo li klarigas la verdan linion de la poluslumo, antaŭ kiu oni ĝis nun staris nekomprenante.

La malkaŝo estos elirpunkto por multaj gravaj esploroj.  
R. Horrisland, Joeland, Norvegujo.

**Fiziko.**

**Grava eksperimento.**

Supera Oficejo de Pesiloj kaj Mezuriloj entreprenis daŭrigan de laboro koncerne difinon de absoluta pezoforto kaj centro de tergloboferto, komencitajn en jaro 1907 ankoraŭ de Prof. Mendeleev. Ĉefa oficejo ricevis la ŝtata trezorejo de Moskva pure oran 32 kg globon, speciale preparitan dum eksperimentado de Mendeleev. La fino de jaro 1923 kaj tuta jaro 1924 estas dediĉitaj por difini centron de terglobopezeco, kiu ne estas kongruanta kun geometria tergloboferto. Sinsekve estas pesitaj grandaj amasoj de diversaj materialoj per plej delikataj pesiloj, kiuj povas montri  $\frac{1}{10,000,000}$  de doloj (0,0004 gr). La eksperimentoj havas plej gravegan signifon por tutmonda scienco.

**Lingvistiko.**

**Ĉu akcepto de latinaj literoj por transskribo de tataraj lingvoj?**

Tataroj, loĝantaj apud Volgo kaj sur Kaŭkazo, ĝis nun en sia skribo kaj prezo uzadis arabajn literojn.

Arabaj literoj estas tre maloportunaj en teknika kaj ekonomia rilato: ĉiu literoj havas po kvar formoj, kaj preskaŭ ĉiu sono havas kelkajn literojn. Ĉi tiu situacio naskis inter tataroj movadon al reformo de la literaro. Kvankam ĉi tiu movado datumas jam de tre longe (1905), ĝi nenian signifon havis ĝis revolucio.

Tiel en Azerbajĝana respubliko (Kaŭkazo) pasintjare oni proponis, anstataŭ arabaj literoj uzi latinajn aŭ rusajn. Post longaj diskutadoj oni tie akceptis latinan literaron kaj nun eldonas per nova, — latina literaro presitan ĵurnalojn „Jane Dun”ja“ (Nova Mondo).

Nun oni ĉi tiun demandon ankaŭ pridiskutas en tatar respubliko, centro de kiu estas urbo

Kazan. En la movado estas du fluoj. Unu estas: reformi arabajn literojn, restigante tiamanere el kvarforma alfabeto nur unu formon; kaj la aliaj: tute forigi arabajn literojn kaj uzi latinajn aŭ rusajn, el kiuj rusaj havas pli multajn tatarajn sonojn ol latinaj.

La rezulto de tiuj diskutoj dume ne estas konata.  
Magjan-Esperantski (Kazan).

**Meteorologio.**

**Nova, pliperfektigia sismografo.**

Ĉefo de la teknika fako de Leningrada fiziko-matematika instituto, profesoro Nikiforov, eltrovis novan specon de sismografo de tre granda sentemeco. Ĝis nun ekzistantaj sismografoj estas tre ampleksaj kaj ne sufiĉe sentemaj al mallong-periodaj vibradoj. Sed ĉe nuntempa sismografo plej grandan intereson prezentas rapidaj vibradoj. Plej perfektaj anglaj aparatoj donas pligrandigon 250-oblan, germanaj aparatoj 200-oblan. Nove konstruita aparato donas 2000-oblan pligrandigon — kaj la pligrandigo estas laŭdeziro ŝanĝebla. Krom tio ĉe la anglaj aparatoj la fundamentaj partoj pezas 1 kg, ĉe germanaj aparatoj ĝis 1000 kg. La famekonata Götingen-a aparato de Gitter pezas 17000 kg. La eltrovaĵo de Prof. Nikiforov pezas nur 40 gr. Ekzamenado de la aparato estas antaŭ nelonge finita en laboratorio de fiziko-matematika instituto de la Leningrada Scienca Akademio. Ĉiuj antaŭaj prikalkuloj tute pruvigis. La aparato estas starigita por eksperimentoj en laboratorio de la instituto. Nuntempe oni komencas konstruadon de similaj aparatoj.  
Trad H. Frank, Kazan.

**Tekniko.**  
**Metallurgio.**

**Sensacia eltrovo.**

Oni scias kiom malfacile tranĉeblaj estas la metaloj, eĉ per ĉizelegoj kaj seĝiloj; kaj do de longe oni uzas por tio la oksidan lampon (blovtubon), kiu ne tranĉas, sed difandas la materion. La metodo tamen ne estas sen ia malutilo, ĉar ĝi bezonas 700 centigradan varmon kaj difektas la apudan randmetalon.

Novaj eksperimentoj ĵus aliris atenton al juna franca inĝeniero el Lyon, s-o Roger, kiu eltrovis novan procedon farantan en estontece grandan servon al la metallurgia praktiko kaj konstruado. Ĉi tiu nova, per oksigeno kaj hidrogeno provizita blovtubo, kiun oni nomas oksidanta flamo, tranĉas la plej harditajn ŝtalojn laŭ miriga facileco kaj rapido. La varmogrado tamen ne superas 25°, kaj ĝi efikas sub akvo same kiel en libera aĵo; la eta flamo eliranta el la tubopinto enpenetras la metalon kvazaŭ tranĉilo en sapon aŭ buteron, distranĉante ĝin laŭ neta streko kaj sen ia difektaĵo.

Jam antaŭ kelkaj jaroj estis faritaj kontentigaj laboratorijaj provoj; sed nun per la unua fojo la sperto okazis pogrande en Toulon je la submarsiĝo Liberté (Libereco), kiu subakvigis post eksplodo antaŭ 12 jaroj. Efektive, por relevi la tro pezan amasegon, oni decidis detranci ĝian kirason kaj oni uzis por tio la novan blovtubon de s-o Roger. La afero tute sukcesis: estis ja

mirinde vidi kiel efikas la maldika flamo facile firtanta sur la ŝirmkiraso kvazaŭ koboldo. Sufiĉis 45 minutoj por detranci 420 tunojn da ŝtalplatoj 18 mm dikaj, laŭ longo de 15 metroj.

Kiel klarigi tiun rezulton? Plej freŝajn ekkonon pri la strukturo de la materio oni elvokas. Scienculoj prezentas multajn hipotezojn, kaj opinias, ke la feliĉa eltrovinto sukcesis ricevi gasan miksaĵon, kiu kapablas dismeti kaj detrui la internatoman energion de la koncerna metalo. — Pluaj teknikaj esploroj estas daŭrigataj por plene klarigi la kialojn.  
A. Esselin, Nancy.

**Nova hidroelektra uzino en Queenston.**

Tiu nova uzino utiligos la ankoraŭ liberan akvoforton de la akvofalego Niagara por la ŝtato Kanado. Ĝi utiligos ne nur la falon de la akvofalo mem (50 m), sed eĉ 90 metrojn, ĉar ĝi estas tre sube. Provizore oni starigis kvin turbinojn por la produkto de sume 55000 ĈP, sed la uzino estas iam nun evoluigebla ĝis ĉ. 600000 ĈP (ĉevalpovo).

**Radiotekniko.**

**Radiotelefono ĉe la kanadaj fervojoj.**

La administracio ĉe la kanadaj fervojoj, kiuj ampleksas 55000 km de oceano al oceano, intencas fordoni al sia centmilo da oficistoj radiotelefonaparatojn kontraŭ pago de la propraj kostoj. La ĝenerala direktoro parolos unufoje en ĉiu semajno radiotelefone al siaj subuloj, kaj superaj oficistoj radioparolados ĉiuvespere.

**Internacia trafiko.**

**La transatlantika radiostacio en Warszawa.**

Ĉar la priskribo de tiu ĉi stacio en n-o 176 de ET verŝajne kredigis al nefakulo, ke la nova stacio estas la plej kapacita kaj plej forta en la mondo, mi volas diri por klarigo la jenon: La nova pola radiostacio en W. estas konstruita de la „Radio Corporation of America“. — La raportinto diris ke la alternatoroj de ĉiuj ĝis nun uzataj sistemoj nepre postulas olean malvarmigilon. Tute ne, la radiostacio de Nauen kaj Königswusterhausen (Germ.) jam de longe posedas akvo-malvarmigilon. — La raportinto multe laŭdis la apartan aranĝon por senigi la antenojn de glacio kaj fulgo. En Germanujo tiu aranĝo ne estas necesa pro la ĝenerale malpli forta malvarmo. La raportinto plue diris, ke la nova pola stacio starigis novan tutmondan rekordon interalie pro tio, ke ĝi povas komunikiĝi samtempe kun 5 aliaj stacioj. Nauen povas samtempe komunikiĝi kun pli ol 5 stacioj kaj Königswusterhausen eĉ kun 20 (dudek) stacioj samtempe.

W. Heinze, elektro-Ing., Radebeul-Oberlößnitz, Sa.

**Statistiko.**

**Gazetaro en Rusujo.**

Laŭ la raporto, prezentita al la antaŭ nelonge okazinta kunveno de la gazetrepresentantoj, nuntempe estas eldonataj en Ĝ. S. S. R. ĉ. 500 gazetoj, elvenantaj sume en 2 000 000 ekzempleroj. La plej granda parto de la legantoj estas urbanoj; nur 85000 apartenas al kamparanaro.

Laŭ „Krasnaja Gazeta“.

**Etiko de l' beleco.**

Laŭ D-o Richard N. Coudenhove-Kalergi. Esperanigita de D-o Sós, Wien.

**1. Moseo kaj Konfucio.**

La du plej grandaj leĝdonantoj en la historio de l' homara etiko estis Moseo kaj Konfucio. Moseo kreis la etikon de la blanka — Konfucio la etikon de la flava homaro.

Moseo kaj Konfucio estas antagonistoj: Moseo bazigis sian etikon sur la kredo — Konfucio sur la sento. Dume Moseo apogis sian etikan leĝdonadon sur mistifikoj, asertante esti ricevinta la leĝotabulojn persone de Dio, sur la monto Sinajo, inter fulmo kaj tondro — Konfucio rezignis al Dio, dogmo kaj superstitio. Dume la granda judo firmigis sian etikan sistemon en la kredo, la granda ĥino emancipiĝis la etikon de la religio: al ĉi tiu cirkonstanco dankas Ĥinujo, ke malgraŭ venko de la religio de Budho ĝi povis konservi sian konfucian etikon.

Dume la religia etiko de la okcidento rilatiĝis al dia diktaĵo, pravigis sin la etiko de Ĥinujo per la „Li“. „Li“ signifas la kategorian imperativon de la harmonio: taktosento, ekvilibro, bona gusto, finfine ĝi estas estetika instinkto: interna belecosento. Tiel staras la konfucia idealo de nobla ĥino kontraŭe al la juda-kristana idealo de bona ĥimo.

Ĝis kiam en Eŭropo regis la kredo al la biblio, ĝis tiem estis ĝia etiko bone fundita. La kredema kristano agas morale pro amo al Dio, pro espero al la ĉielo kaj pro timo al la infero: ĉar li kredas al Dio, al biblio, al rekompenco kaj al transjafo.

Ĉi tiu kredo estas ŝanceligita per la emancipo kaj kune kun ĝi la eŭropa moralo. Eŭropo komencas el la teoria premiso: „ĉio estas problema“ konkludi la praktikan konsekvencon: „Sekve ĉio estas permesita“.

La dekadenco de la eŭropa moralo, de ni spertata, signifas vivodanĝeron por la eŭropa kulturo. Ne ekzistas da por Eŭropo pli grava demando ol la jena: „Kiel estas ebla la savo kaj renovo de la moralo en Eŭropo?“

La spiritalaj pioniroj de la okcidento donis al ĉi tiu demando tri respondojn. La unua estas sub la signo de Kristo, la dua sub la signo de Budho, la tria sub la signo de Konfucio.

La unua respondo esperas restarigon de la etiko pere de restarigo de l' kristaneco. Malgraŭ tio, ke eminentaj viroj, nome Tolstoj kaj Strindberg, rekomencas ĉi tiun vojon, ĝi tar en ne kondukas al celo; ĉar la abismo inter scienco kaj biblio estas tro granda. Por esti ankaŭ aŭ transpigitaj: tial la moderna eŭropano devas decidiĝi aŭ kontraŭ la scienco — aŭ kontraŭ la biblio. Kaj plej ofte li decidigas kontraŭ la lasta.

La dua respondo serĉas kompenson en nova religio por la ruinoj de la malnova. La transjano anstataŭ Karma, la inferon kaj ĉielon rena-kigo kaj Nirvano. La budhista dogmo anstataŭ la kristanan. Antaŭ ĉi tiu vojo, rekomendita de Schopenhauer kaj propagandata de la teozofo, por eŭropanoj ne estas surirebla: ĉar la aktiva kaj norda Eŭropo povas neniam esti ĉe la tia kontemplativa monpercepto.

Restas do kiel lasta elirejo el la etika haoso la vojo de Konfucio. Post la ruinoj de la kredo estas sento la sola elirpunkto al renovo de l' moralo. Por savi la etikon, ĝia fundamento devas esti ŝanĝata; post ĝia liberigo de la patroneco de dogmo, ĝi devas esti nove fondata sur la neperebla fundamento de l' beleco.

Kant estis Konfucio de la okcidento. Li anstataŭis la revelacian etikon per naturo, la dian etikon per homo. Li eltrovis en la brusto de ĉiu homo novan Sinajon kaj en la konscienco de ĉiu homo novajn leĝotabulojn. Per elpenso de l' „nepra imperativo“ li liberigis la etikon de la patroneco de l' mitologio.

Kant eltrovis la esconon de moralleĝo — sed ne ĝiam fonton. Lia moralleĝo estas sen kontakto kun la ceteraj gravaj leĝoj de la naturo. Estis la merito de lia eminenta disĉiplo Friedrich Schiller, trovi la radikojn de la moralleĝo en la regno de belo kaj tiamanere firme kunigi etikon kun estetiko. Goethe kompletigas per sia vivo kaj ago ĉi tiun modernan renaskigon de la antikva „kalokagatio“. Nietzsche daŭrigas lian verkon: li metas konscie sur la lokon de l' kristana dualismo bono-malbono la kontraston noblo-malnoblo kaj fariĝis tiel profeto de la etiko de beleco.

**2. La etiko de l' „gentleman“.**

Nietzsche postulas: „Mi volas, ke la homo estu: honeste kontraŭ si mem kaj kontraŭ ĉiuj, kiu cetere estas amika al li; kuraĝa kontraŭ malamikoj; grandanima kontraŭ venkito; ĉiam genilia.“

Ĉi tiu postulo de Nietzsche konformigas kun etiko, kiu jam antaŭ li ekzistis kaj sin disva-ŝigis sen religiaj kaj ŝtataj sankcioj: la etiko de l' „gentleman“.

La etiko de l' „gentleman“ estas etiko de beleco kaj kiel ĝi sendependa de religia konfeso. Pli kristano kaj judo povas esti „gentleman“ same kiel iu liberpensulo. La „gentleman“-idealo devenas de la kavaliara etiko de honoro. Nobelo estas la prototipo de „gentleman“.

Estis granda fero de la angla burĝaro ke ĝi, transpreninte la politikan heredaĵon de feŭdismo, transprenis ankaŭ la belovojorojn de l' kavaliro kaj ĝin transformis al burĝa „gentleman“-idealo, forigante ĉiun elementojn de tiu etiko, kiuj havas defendan klasokarakteron.

La proletariaro, kiu hodiaŭ pli podas transpreni la heredaĵon de l' burĝaro, devus sekvi ĉi tiun ekzemplon, kaj, anstataŭ rifuzi la „gentleman“-idealon, purigi, humanigi

kaj profundigi ĝin. Ĝi devas digumi ĝian burĝan klaso karakteron kaj ekskapitaligi ĝin. La socia pozicio de homo devas fariĝi sendependa de lia ekonomia stato. La pura koro kaj la takto de homo decidu — ne la akudritaj manumoj al la vespera robo.

Estus grava eraro rifuzi la „gentleman“-idealon, anstataŭ reformi ĝin. Ĉar malgraŭ ĉiuj siaj mankoj ĝi estas la sola senreligia etiko, havanta esence praktikan valoron en la okcidento; el ĝia internigiĝo kaj humanecigo povus rezulti nova vivoformo, kies standardo-portanto povus esti la proletariaro.

Antaŭ ĉio estas ekkoninda, ke la „gentleman“-idealo konsistas el du heterogenaj elementoj: el la eterna kaj el aktuala — el etika kaj el socia idealoj. La internirko de ĉi tiuj du el-menoj grave kompromitis la „gentleman“-idealon. Por savi la eternan „gentleman“, oni devas oferi la aktualan.

La ideala „gentleman“ de ĉiuj tempoj kaj rasoj estas verama kaj honesta malegoista kaj sinregnata, grandanima kaj bonkora, kuraĝa kaj milda. La esenca principo de eterna „gentleman“ estas: ĉie, kie honoro kaj intereso koliziĝas, decidiĝi senprirpense por la honoro kaj kontraŭ la intereso; pli volonte aĝi bele ol ruze. Plua principo de l' „gentleman“-idealo estas la Fair play (honestia ludo; sincera, neniel riproĉebla ago): neniam trafiki lin malprofitulon aŭ sendefendulon, aŭ malbone agi lin, neniam uzi malnoblan rimedon, ĉiam helpi al malprofitulo kontraŭ plifortulo defendi ĵustecon kontraŭ maljusteco, vercon kontraŭ mensogo. Vera „gentleman“ respektas malunecon, respektas virinon. Li volas perfektigi sian internan kaj eksteran belecon koncerne formo kaj enhavo ĝis plej alta grado. La sendepende de l' etika „gentleman“-idealo de tempo kaj raso evidentigas el tio, ke la nuntempa ĥina filozofa Ku-Hung Ming nehezitante tradukas la konfucian idealon de nobla homo per la vorto „gentleman“. Per tio li identigas la idealon de antaŭkrista Ĥinujo kun la idealo de moderna Anglujo.

La efektiva filozofio de la eterna „gentleman“ estis la Stoa. Tie estis la „gentleman“-ideo tiel profundigita, ke ĝi fariĝis sendependa de pozicio kaj klaso. Estas rimarkinde, ke ambaŭ ĉefeklezistoj de la malnovromana Stoa estis imperiestroj kaj proletoj: la imperiestro Marko Aŭrelio kaj la sklavo Epikteto.

La Stoa postulas, ke la homo metu ĉiam kaj ĉie la virturon super la guemon; ĉi tiu postulo en la antikva terminologio estas identa kun la postulo de l' „gentleman“-idealo; oni la honoron super la intereson.

La stoika etiko radikas en la greka idealo de Kalokagatio „Agathos“ signifis tiam por la animo la samon, kion „kalos“ signifis por la korpo. Virto estis beleco de la animo: tial ĝi estis nepre valora. Daŭrigo sekvas.



**Foiroj kaj Ekspozicioj.**

**Internacia Ekspozicio de Poŝtmarkoj.**

Okaze de la 75-a datreveno de la poŝtmarkuzado en Belgujo (1849-1924), estos aranĝata en la Egmont'ala Palaco en Bruxelles, de la 24 majo ĝis la 1<sup>o</sup> junio 1924, Internacia Ekspozicio de Poŝtmarkoj, sub la alta protekto de Lia Moŝto la Reĝo de la Belgio, kaj organizata de la Reĝa Federacio de Filatelaj Klubo de Belgujo.

Ĉiujn korespondantojn, ankaŭ esperante, oni adresu al jena adreso:

Exposition internationale de Timbres-poste. Fédération royale des Cercles philatéliques de Belgique, Palais d'Egmont, Place du Petit Sablon, Bruxelles.\* V. H., Bruxelles.

**Internacia sporto.**

**Pri la 1000-kilometra ski-kurado.**

La malfrue ricevitaj gazetoj iel priskribas la finon de la unika ski-kuro: trapasinte sen pluj avenuoj urbojn Ĉerepovec (la 11. 1.), Ĝiglic (la 15. 1.) kaj Kallazin (la 17. 1.) la partoprenantoj alvenis al Moskva dimanĉe, la 20. 1. Alproksimiĝante al la fincelo, ili estis rentonitaj de taĉmento da skistoj kiuj akompanis ilin ĝis la renkontejo, organizita de la konstru-ita stadiono sur Ĉur-bovi Gori (Paseraĵ montoj), konata apudurba sportejo. La renkonton ĉeestis reprezentantoj de diversaj profesioj, laboristaj kaj partiaj organizajoj, komitatanoj de l' Supera Instituto por fizika kulturo, jurularaj kaj sportistaj organizajoj kaj amaso da publiko. Ovacie renkontitaj la bravaj vojaĝintoj ricevis artan honoran premion, prezentanta marmoran koloneton, kronitan per la tergloblo kun markita troirita distanco. Parado de militaj kaj civilaj skistoj finis la feston.

Medicina esploro de l' skistoj montris nenian damaĝon je ilara sano.

Antaŭ nelonge unu el la partoprenantoj faris raporton pri la marŝo. Entute la skistoj treiris 7 guberniojn kun malsamaj topografo kaj klimato. Grandaj estas la super-tialhelpoj de l' longa kaj danĝerplena vojo: la partoprenantoj devis kontraŭbatali ne sole la severan nordan naturon, sed ankaŭ bestojn: ne malofte ili devis protekti sin kontraŭ atakoj de malsatitaj lupoj.

Flankentante la spaciajn militistajn celojn de l' kuro, la lasta havis ne malgrandan signifon rilate propagandon pri skiado. En no-da kaj precipe en meza Rusujo la skiado malgraŭ kelkmonata vintro estas apenaŭ konata krom kelkaj esceptoj de la ĉesistoj, uzantaj tute primitivajn skicajn. La marŝo pervide pruvis al la tiea kamparanaro la avantaĝojn de l' rapida kaj facila komuniĝo inter la izolaj vilaĝoj enterigitaj en profundan netraireblan neĝon kovranta la vastajn kamparojn de l' treiritra regiono.

R. Lorentson, Tallinn.

**Hinaj piedpilkistoj en Aŭstralio.**

La internaciaj renkontoj de l' sportistoj iĝas lastatempe pli kaj pli ofitaj kaj renkontigaj la reprezentantojn de la plej malproksimaj kaj malsimilaj popoloj kaj rasoj. Unu el tiaj okazis en Aŭstralio, vivitita de trupo da hinaj piedpilkistoj. La malofitaj gastoj restis tie sufiĉe longan tempon, dumante 24 ludojn. Hinaj gajnis 8 ludojn kaj malgajnis 9 dum aliaj 7 ludoj restis senrezultaj. La ludoj estas vizititaj de 134 000 ĉeestantoj.

**Naĝado.**

El Buenos Aires oni antaŭ ne longe sciigis pri nova rekordo de naĝado. Fraŭlino Hawson transnaĝis la riveron La Plata (26,5 anglaj mejloj) en 24 horoj kaj 19 minutoj, stariginte la mond-rekordon pri daŭreco kaj distanco.

R. L.

**Filatelio.**

**Rusujo.**

Okaze de morto de Lenin estas eldonita serio de funebraj poŝtmarkoj kun portreto de la mortinto en nigra kadreto. La tuta desegnaĵo estas ĉirkaŭita de ruĝkolora rando. La serio estas nedentumita kaj konsistas el 4 markoj je 3, 6, 12 kaj 20 or-kopejoj.

**Diversaĵoj.**

**Lastaj novaĵoj.**

Filmo-raporto de J. Major, Budapest.

El Ang'ujo oni anoncas, ke la Sudafrika Telefonreto estos provizata per aŭtomataj centroj.

La Brita Radiotelefona Kompanio projektas telefonadon de marmugaĵo kaj eventuale de kanto de najtingaloj.

En Kalifornio okazas pli da mortoj per motor-akcidentoj ol per infektaj malsanoj.

La plej granda rivera fortoregulo estas tiu de la Niagara-akvofalo. Ĝia pezo estas 150 tunoj.

En Chicago oni konstruos novan Universitaton, kiu kostos 5 milionojn da dolaroj kaj estos la plej granda altlernejo de la mondo.

Rekordo estas atingita de la Kanada Pacifika Fervojo. Oni transportis dum unu tago 1800 vagonojn da greno. Jen nova pruvo per kia bona efekte laboras tiu ĉi fama fervojo.

La stabileco de la Eiffel-turo estis ĝuste garantiata por 25 jaroj per inĝeniera komisiono.

La vojaĝo de New York al San Francisco estas nun malpli longigita per la Moffat Tunelo en la Rocky Montaro. La vojo malplilongigias je 178 mejloj.

Aŭtomata telefonreto estas enkondukota en London. Ĝi havos tri grandajn centrojn kaj funkcios sen homa helpo.

En Ameriko oni purigas lerneajn tabulojn per elektro.

Elektrigo de la Aŭstralia Fervojo finiĝis. Ĉiuj linioj estas nun elektraj.

Granddimensia konstruado komenciĝas en Japanujo por rekonstrui la detruojn de la lasta tertremo. Oni aĉetis lignomaterialon de Ameriko en kvanto de 97 milionoj da futoj.

Sur la grandaj bulvaroj de Paris komuniĝas nove sesradaj, grandaj aŭtobusoj kun 48 sidlokoj. Longeco de la veturiloj: 10,43 m, larĝeco 2,25 m (34 CP).

**Pasko 1924 kiam?**

Stranga estas la nunjara dato por pasko. Laŭ la regulo pasko estas festata je la unua dimanĉo post la unua plenuo printempa; la komenciĝo de printempo estas ĉiam la 21 marto. Je la sama tago de ĉi tiu jaro estas ankaŭ plenuo, do kredible la unua printempa plenuo. Sekve la sekvanta dimanĉo, la 23-a, devus esti pasko. Tamen la kalendaristo prokrastis ĝin je kvar semajnoj ĝis la 20 aprilo. Estus laŭdinde, se li volus pravigi la aferon! *Leono Funken, Koblenz.*

**Kroniko.**

Por servi nian legataron per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informaro, ni bezonas sciligojn (sur postkato al aparta folieto unuankele skribita, sed ne inter administrat' aŭ privataj sciligoj) pri ĉiu novaĵo el l' Esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde, legeble (precipe nomoj)

**Ameriko.**

**Paragvajo.**

En tiu ĉi lando Esperanto estas nur malmulte disvastigita. Trovigas esperantistoj en div. lokoj. En Asunción pri pagandao s-o D-o José Tomas Barbosa, vigla korespondanto.

**Salvadoro.**

La eldonistoj de la plurlingva komerca gazeto „Revista Económica“ en San Salvador kun oficejoj en Honduraso, Kosta-Riko, Nikaragvo kaj Gvatemalo ekinteresiĝis pri la komerca movado esperanta kaj tiucele interŝanĝas esp. gazetojn. Estas dezirinde, ke multaj propagandistoj kaj speciale izolaj samideanoj el Salvadoro kaj la aliaj ŝtatoj interrilatu kun la eldonistoj.

**Eŭropo.**

**Danujo.**

En Odense, kiu certe estas la plej vigla Esperanto-urbo, estas ĉ. 100 membroj en „Odense Esp. Forening“. El siaj membroj oni fondis „Konversacia Klubo“ kun 13 membroj, kiuj kunvenas unuan kaj trian vendredon ĉiunonate en „Park Hotel“.

Odense Esp. Asocio eldonas litografitan gazeton „La Laboro“. La estraro de Odense-a Esp. Unuiĝo nun konsistas el: Alf. Christensen, prez.; A. Andersen, sek.; s-ino M. Sorensen, reviziistino, J. Witte, kas.; del. de UEA estas s-o N. S. Carlsen; del. de UEA s-oj Kjar kaj Henriksen. N. C. Carlsen, cand. mag., instruas infanojn en „Muleres Legatskole“ kaj la lernantojn en Komerclernejo, kien estro li estas. Alf. Christensen, prez. de „Konversacia Klubo“, ofte skribas artikolojn pri Esp. en naciaj gazetoj; li estas redaktoro por la gazeto „La Laboro“, kiun li fondis kune kun s-oj M. Palsberg (nun Aarhus) kaj H. Madsen (nun Estonio).

**Franco.**

Perpignan. La 9 marto 1924, s-o René Lliech, delegito de l' Esp. Mediteranea Federacio, faris paroladon pri Esperanto kaj komercio de la komerca lernejo „Pigier“. Bone anoncita per la gazetaro la konferenco estis aŭskultata de multaj personoj. La aŭskultantoj subskribis sur leteron sendita al American Radio Relay League por informi tiun organizaĵon ke nur Esperanto taŭgas por la radij rilatoj. Afliŝo kun „Cours de langue universelle Esperanto“ estis metita sur la muroj de la komerca lernejo. La Federacia Kongreso kiu okazos en Perpignan je Pasko 1924 (30 aprilo) devas esti la spegulo de la movado en suda Francujo. Ni petas la gesamideanojn dezirantajn partopreni tiun kongreson tuj sendi siajn aligojn. (Oni komprenos ke, ĉar tiu kongreso okazos antaŭ la legodona elekto, ĝi devas havi grandan sukceson „Amika Rondo“, Ecole Pigier, Perpignan.

Céret. Lndon 21 aprilo kiel komplemento de la federacia kongreso okazos esp. ekskurso al Céret. La gesperantistoj de tiu urbo fervore preparas la akcepton (oni ludos esp. komedion).

**Germanujo.**

Koblenz. Laŭ speciale invito la loka grupo aranĝis prop. paroladon per s-o L. Funken dum kunveno de la laboristaj unuiĝoj (Freie Gewerkschaften) kaj ties gvidistoj. Ĉeestis ĉ. 60 personoj. Oni esperas pri instalo de kursoj.

**Hungarujo.**

La prezidantelekta kunsido de la Hungarlanda Esp. Socio.

Dimanĉe, la 9 marto, la hungara Esperanto movado eniris en novan periodon: okaze de la jara ĝeneralkunveno en Budapeŝt post perolo de vicprezidanto Stefano Nagy Molnár laŭ propono de la elekta komisiono la 52 membra kunsido per levigo unuvoĉe elektis kiel prezidenton: Episkopon Antonio Nemes. La episkopon alvokis delegitaro de la kunveno kaj lin salutis de lia alveno vicprez danto Nagy Molnár. Nemes latlegis esperanlingve sian respondon, en kiu li skizis la estontan agadon de la socio La kunsido entuziasme akceptis la paroladon. En nomo de provincaj grupoj salutis la novan prezidanton Prof. König el Miskolc, Flino Medvezky el Kaposvar kaj en nomo de U. E. A. ĉefdelegito Balkányi. Ĉefsekretario D-o J. Tekács raportis pri la movado. Ekzistas nun 9 grupoj kaj multloke nur izolituloj. La ekonomiaj cirkonstancoj multon malhelpis sed la edono de Hungara Esperantisto per la socio esperable helpos pli bonan organizon. Sukcese laboris la Esperanto Instituto. Post la aprobo de la raportoj oni reelektis la estraron per sekvantaj ŝanĝoj: vicprezidanto farigis D-o Béla Rác de Kővesd, ĉiama honorprezidanto, honora membro: univ. Prof. D-o Zoltán Pázmány de Szilas, subsekretario: Jozefo Gregorius, notario: Toitsche, dommaŝtro: Szentgyörgyi. — La sukcesan kunvenon finis per kelkaj vortoj episkopo Nemes esprimante la deziron, ke Esperanto reale farigu la lingvo de la interkomprenigo tutmonda por akiri per ĝi la pacan kunvivon de la homaro en plena, feliĉa amo.

**Italujo.**

Sekve de la laŭdindaj klopodoj de s-ano Stefano La Colla, del. de UEA, la Esperantista Grupo de Palermo estas nun reorganizita. Ĝia sidejo estas ĉe la sekcio de „Hala Montekursa Klubo“. La estraro konsistas el s-oj: Stefano La Colla, prez.; Prof. Luigi Borrello, vicprez.; ing. Federico Cacio, nacia sek.; Leonardo Palagonia, internacia sek.; ing. L. Maisano kaj Avv. P. Nalli, revizoroj; pastro Gaetano Abbratozato.

S-ano La Colla gvidas du kursojn: unu de Halesista Grupo, alian de la Esperantista Grupo por grupanoj. — Baldaŭ li malfermos alian kursojn de la Meza Komerca Instituto. La du antaŭdiritaj kursoj estas vizititaj ankaŭ de fraŭlinoj kaj ĉiuj ekvidigis firman emon je lernado.

Adreso de la grupo ĉe s-ano Stefano La Colla, Via Goethe, 40, Palermo (13).

**Jugoslavo.**

Novisad S. H. S. La 30 sept. 1923 fondis s-o Fr. Csauth „Esperantistan Laboristan Rondon“, kiu estas la dua grupo en nia urbo. — La 3 sept. li komencis gvidi kurson por gelaboristoj; partoprenis 23 personoj. La 16 dec. okazis en la vi-ina instruisita lernejo la memorfesto por D-o L. Zamenhof, la sukceso estis bona, ĉeestis proksimume 250 personoj, inter ili multaj gastoj el Beograd, Zemun, Subotica kaj Zagreb. — Pri Esp. parolis D-o Dušan Maruzzi, landa prezidanto el Zagreb, Béla Spitzer, del. de UEA el Subotica. — Pri Zamenhof s-o Solovjev, estinta kunlaboranto de D-o Zamenhof nuntempe loĝas ĉi tie. Post la paroladoj sekvis koncerto-kabaredo kaj danco.

La 20 januaro 1924 okazis la kunsido por la renoviĝo de la estraro kaj la fikso de la laborplanoj por 1924. Nuna estraro estas: prez. s-o Marko Nečits, vicprez. s-o Fr. Csauth, sek. s-o Henriko Šura, notario s-o Lorenzo Csauth, kas. s-ino Babeto Csauth, kontr. s-o Stefano Maglič, 2 kontr. s-o Savo Borovac, bibl. Karlo Sandaliĉ, anstataŭantoj s-oj Mihailo Pečkovski, Rudolfo Ertl kaj Ewald Schütze. Kunveno estas ĉiudimanĉe positaĝmeze je la 3 h. en la Laborista Domo, Temeŝka s-irato 12. —

La 21 januaro malfermis duan gelaboristan kurson s-o Fr. Csauth, videl. de UEA; enskribiĝis 38 personoj.

**Al ĉiuj UEA-amikoj!**

Ĉar la laboro por UEA estas gravega laboro, la nove fondita „Aŭstra Pacifista Esperantista Societo“ decidis aliĝi al UEA kiel MA. Estus tre necese, ke ĉi tiu Esp.-unuiĝo en ĉiuj lokoj de la tuta mondo (almenaŭ ĉiuj mezgrandaj) oficiale aliĝu al UEA kiel MA. Estas nepre devo de ĉiuj unuiĝoj, treege subteni UEA, kiu devas posedi kiel eble plej multe da anoj, por ke ĝia influo kiel gvidanta organizaĵo de la Esp.-movado fariĝu tia, ke la registaroj de ĉiuj landoj profunde estimu tiun mond-organizaĵon, kiu gvidu la tutmondan Esp.-movadon al baldaŭna veno.

Stöger, sek.

Rudolf Michael Frey

prez. de APES  
kaj UEA-del. por la ill. IV., X. kaj XI distriktoj en Vien.  
Adreso: Ill., Bechargasse 14, Tür 18.

**Transatlanta Radio-parolado en Esperanto.**

**Al samideanoj de la tuta mondo.**

La 5 aprilo 1924 je la 6.15 (18.15) h. vespere laŭ tempo de New York mi parolados de WOR-stacio en Newark, New Jersey, Usono. Tiu stacio uzas ondolongecon de 405 metroj kaj kutime anoncas la programojn sub nomo „Bambergers“ anstataŭ aŭ kune kun „Wor“. Oni jam ofte aŭdis ĉi tiun stacion ĝis Mez-Eŭropo, la Havajaj insuloj en la Pacifika Oceano kaj Mez-Ameriko. Ĉi tiun fojon mi esperas, ke eĉ Japanujo kaj Ĥinuĝo aŭdos ĝin.

Multe da intereso ekzistas ĉi tie pri ĉi tiu eksperimento, ĉar mi anoncis, ke mi faros la unuan klopodon por paroli en Esperanto de Nord-Ameriko trans marojn kaj landlimojn. Pro granda propagando, kiun ni en Ameriko lastatempe faras pri Esperanto kaj radio-telefono, dekmiloj da radio-amatoroj atendas la 5 aprilo. Mi komencos la paroladon en angla lingvo por propagandi nian aferon al Nord-Ameriko kaj Anglujo, sed la lasta parto estos en Esperanto al la tuta mondo. La horo estas tempo de New York; ĝi estas la 23.25 h. en London; la 0.15 h. (de dimanĉo 6 aprilo) en Paris, Berlin ktp.; la 8.25 h. (de dimanĉo 6 aprilo) en Tokio, la 5.45 h. (sabate vespere) en Habano, Kubo, 5.15 h. vespere en Meksiko-urbo ktp.

Mi petegas ĉiujn samideanojn, uzi ĉi tiun okazojn kiom plej eble multe kiel propagadilon kaj se ili aŭdos min, sendi al mi per kablogramo mallongan scilion pri la fakto laŭ adreso: Sayers, Linivers, New York. Se vi ne povos kablografi tuj, almenaŭ sciigu min letere, por ke mi povu utiligi la okazon almenaŭ en nia propagando. Mia poŝtadreso: James Denson Sayers, Box 223, City Hall Station, New York, Usono. Mi ankaŭ petas, ke ĉiuj esperantistoj, kiu interesiĝas pri radio-telefono kaj Esperanta Monda Radio Ligo, tuj skribu al mi pri tiu fako.

James Denson Sayers, New York.

**Al hodiaŭa numero estas aldonita la mara numero de „Revuo“.**

Por la „Kroniko“  
uzu telegram-stilon !!



### Libera tribuno.

Sub tiu ĉi rubriko laŭ disponebla loko estas lojale esprimataj ĉiuj sciigoj, informoj, kritikoj, liberaj vortoj ktp. La redakcio tamen ne prenas sur sin ĉiun respondecon pri la enhavo, sed ĝi rezervas al siaj rilatoj eventuale rifuzi netaĝajn artikolojn.

#### 261. Teknikaj terminoj.

Mi konstante notas menciojn de la laboro de komitatoj, kiuj preligas teknikajn vortarojn por la inĝenieroj, la kuracistoj, kaj aliaj lertaj profesioj — sed, kiam mi deziras priskribi por fremda korespondantino metodon por fari trikotojn — mankas la teknikaj esprimoj en mia vortaro! Kvankam neniu malkonsentis, ke estas grava kaj tre utila tasko preĝigi vortojn por la plej grandaj industrioj kaj profesioj, kiuj vere estas internaciaj, ŝajnas al mi ke estas egale grava kaj multe pli helpema, starigi vortarojn de la esprimoj uzataj en la mastrumadoj arte, kiuj estas, almenaŭ por ni esperantistoj, sendube la plej internaciaj.

Do, mi sugestas ke, je la venonta jara kongreso, komitato, enenanta certe virinojn, estu starigita por elpensi esperantajn esprimojn rilate al la sekvantaj hejmaj artoj:

- Trikado,
- Kroĉtrikado,
- Brodarto,
- Vesfarado,
- Capellfarado,
- Kuirado.

Tiu tasko, mi opinias, ne estas treege malfacila, ĉar tiuj artoj uzas ne grandan nombron de specialaj esprimoj, kompare kun, ekz., la inĝenieraro. La naciaj societoj povas helpi, antaŭ la kongreso, preĝigante historion de la naciaj esprimoj (ne forgesante la mallongigaĵojn), kaj la agojn kiujn ili signifas.

Imagu la praktikan utilecon de tiaj vortaretoj! Niaj inaj membroj povas interŝanĝi tuj siajn modelojn kaj metodojn favoratajn. W. R. Wood, Torquay, Anglujo.

#### 262. Rilatas al 201 kaj sekvantaj.

Ŝajnas, ke tiu demando, kiam mi starigis en 201, estas sufiĉe esportita. Ĉiuj konsentas, ke se ni neas la verbon ni devas meĉi partikulan ne senpere antaŭ tiu la verbo kaj ne disigi per vortoj ankoraŭ, jam ktp. Nome tia estis mia d-mando. Kaj rezonadoj pri tio, ke ne jam, kaj ne ankoraŭ havas tute alian signifon ol jam ne kaj ankoraŭ ne, estas tute superflujaj...

S-o Leo Dreher tute prave diras, ke „D-o Zamenhof, gvidata de la slavaj lingvoj, kutime uzis sole ankoraŭ ne kaj jam ne, dum kontraŭe, la francaj samideanoj samkiel aliaj laŭ ilia ekzemplo enuzigis: 1. ne ankoraŭ en la (malgusta) senco: ankoraŭ ne, kaj 2. ne jam en la (gusta) senco ankoraŭ ne“ (n-220).

Unu el niaj plej bonaj stilistoj D-o K. Bein (Kabe), en sia bonega parolado 9. 8. 1905 en Unua Univ. Kongreso en Boulogne sur-mer diris interalie, ke unua periodo de la esperanta historio estis rusa kaj ke „la lingvo multe ĝajnis de tio, ke la unuaj aŭtoroj estis slavoj: la simpleco de la slavaj sintakso, la logika aranĝo de la frazoj en la slavaj lingvoj, ilia absolute libera kaj natura vortordo estis senkonscie enkondukitaj en Esperanton de la slavaj aŭtoroj kaj estis poste imitataj de nestavoj... Post la rusa venis la franca periodo de Esperanto, kiam... oni komencis tro zorgi pli la teorion de la lingvo, penis skribi tro klare, kaj enkondukis multepezan stilon...“

Unu el postsignoj de tiu franca periodo kaj ĝia „multe-peza stilo“ estas ankaŭ la montrataj de mi vortordoj: „ne jam“, „ne ankoraŭ“ ktp. antaŭ la verboj.

La unua, plej grava postulo en nia lingvo estas — simpleco kaj bona, tuja, facila komprenebleco. Prof. Th. Cart, prezidanto de L. K. iam delonge diris: „en Esperanto estas, 1-e nur unu stilo regulo skribi plej klare; kio estas klara, tio povas esti nekorekta, sed neniam malbona; 2-e unu malpermeso: skribi malklare; kio ne estas klare, tio povas iafajle esti korekta, sed neniam bona.“

El rezonadoj de K. Minor, Adoŭf Vimson, P. Medem, Hermann Wagner ni vidas, kiom neklara kaj malkompreneblaj estas esprimoj „ne jam ploras“, „ne ankoraŭ ploras“ ktp. Sekve ili ne estas bonaj; kaj, laŭ Cart, ili estas eĉ „malpermesindaj“. Kontraŭe la esprimoj „jam ne ploras“, „ankoraŭ ne ploras“ estas tute simolaj, klaraj, facile kompreneblaj; sekve ili estas tute aprobindaj. Kaj mi ripetis: en nia tuta „Fundamento“, en ĉiuj verkoj de nia Majstro ni neniam renkontas la unuajn vortordojn.

Ĉiu tio ne estas sufiĉa pruvo de la praveco de mia rezonado?

Krom tio nia Majstro mem en sia respondo 26 diris: „Ja esprimon ne jam“ (kiu signifas ion tute alian ol „jam ne“) mi tute ne konsilas uzi, ĉar ĝi povas kaŭzi malkomprenigon; anstataŭ ĝi mi konsilas uzi „ankoraŭ ne“. Kial do ni malatentu ĉiun kompententan konsilon? Aliflanke se (kiel diras K. Minor kaj Hermann Wagner) „ne ankoraŭ“ estas „iam ne“, kial do ni preferu la unuan malkompreneblan vortordon kaj forĵetu la duan tute klaran kaj kompreneblan?! A. P. Andrejev, Tiflis.

### Al ĉiuj laboristoj!

Karaj gekamaradoj en ĉiuj landoj! Jam du jarojn mi pripensas ideon, novegan vojon de la interkomunigiĝo tutmonda. Mia ideo celas jenon: Ĉiuj laboristoj helpu ekstarigi novan entreprenon, simile kiel poŝto, fervojo, Radio ktp. La duono de ĉiuj enspezoj mi deponos ĉe banko kiel kapitalon por la laboristaro tutmonda. Plue mi intencas, fondi „oficejon por eltrovaĵoj, faritaj de laboristoj“. — Kial mi faras tian laboron? — Jen: Ĉiuj laboristoj havigu al si la profiton de sia laborado! — Helpu al mi, gekamaradoj! La lingvo Esperanto estu la lingvo de nia entreprenon. Pli detalajn sciigojn per broŝuro en Esperanto aŭ germana lingvo. Havebla de F. Henkels, Burgplan 13, en Scheidnitz (Germanujo). Prezo: 0,50 Mk. (ora) por Germanujo kaj Aŭstrio; 1,00 Mk. (ora) por aliaj landoj. — Esperantistoj! traduku mian artikolon nacilingve!

#### Membro en pli ol 40 landoj

Unua klubo por interŝanĝi poŝtmarkojn, poŝtkartojn, listojn, papercaron ktp. kaj por korespondado kun la tuta mondo. Postula prospekton kontraŭ respondekupon de s-o

Fr. Jakobi, Bahnhofstrasse 29, Coblenz - Germanujo



6. BIS 12. APRIL

INTERNACIA FOIRO DE FRANKFURT A.M.

6-12 aprilo.

Forster 1 1/2 Ĉ. P. Motorbiciklo

Garantio: 12 monatoj Modelo 1924

1 cilindro, 2-takta, 140 kubcm, 2-transmisilo, liberrado, kupligo kaj oportuna rimen-sirĉo, vetur-rapideco 10-60 km pohore, suprenprezo ĝis 20%. Esenc-konsumo ĉirkaŭ 1 litro da benzino kaj 1/4 oleo por 50 km.

Tuj liverbla el provizejo.

Prospektoj (germane kaj france) kaj informoj senpage haveblaj de

Gehr. Forster, fabriko de Motorbicikloj Hinwil (Zürich), Svislando.

Seriozaj pagokapablaj reprezentantoj serĉataj en la tuta mondo.

Atentu! Por vi!

Ni serĉas por bonŝanca fabriko de tolejoj fondata de unu el niaj membroj kapitalon por pligrandigo. La bezonataj 40000 ormarkoj estas dividataj en bilojn po 100 ormarkoj = \$ 24. — U.S.A. — Remo 10% kaj dividendo de 0,025% de l' neta irprofito de la fabriko. Por la biloj hipoteko estos enregistrita! Samideanoj subtenu la esperantan entreprenon kun nomo „Tolo“ kaj partoprenu por monprunto.

Ni ofertas „Miraklo Ovoj“ (Esperanto-ludo). Respondas al demandoj „Kiel mi estas amata?“ Per kio mi havos sukceson?“ Du ekzempleroj 0,50 \$ — Krome „Sperton“ efika gardilo por virinoj. Ne malhelpas la sanecon Tebutolato de 12 tabuletoj \$ 0,50. Ni peradas ĉiuj demandojn pri varoj kaj negocoj.

Esperanto Komerista Grupo Hauptsirasse 38, Dresden — Germanujo.

Tiu, kiu deziras konatiĝi kun nia movado en Ĥinujo nepre devas aboni

„LA VERDA LUMO“

„Oficiala organo de la Ĥina esperantistaro“

Provonumero: 1 resp. kup. Jarabono: 10 resp. kup.

Redakcio kaj Administracio 737 Avenue Foch, Shanghai, Ĥinujo.

Ni serĉas perfektan, diligentan Maŝinkompostiston je Linotipo (simpla) por la kompostado de ET kaj de germanlingva ĵurnalo. Kondiĉo: sufiĉa scipovo de Esperanto.

T. & H. Jung, Horrem b. Köln

Saĝaj sinjorinoj!

Atentu, se vi uzas rimedojn kontraŭ malhelpoj en la mensruaco! — Esu singardaj pro oferto, kiuj nur malofte plenumas tion, kion ili promesas!

Savon kaj novan vivogojon alportas mias de Jardekoj provita s-o e i g i - r i m e d o t. Ili forigas malsaneman ekhaltajn, kiuj povas pusti viajn mias esperon. — Ili ankaj helpas en malfacilaj statoj. Plej simpla uzo, garantilite sen malutilo. Nenlu malhelpo al laboro. Mutaj liberuloj kaj koraj dankesteroj pravas la sukceson, konstateblan ofte jam post nur kelkaj horoj. Se dudu diskrete per rembuso. Cu vi suferas? Se jes, skribu ankoraŭ hodiaŭ!

Higiena entrepreno: W. Heilmann, Bellealliancestr. 46, Hamburg 19, 1947.

Anoncetoj.

Anoncetoj pri esperantista vivo (na-kiĝo, Ĥandigo, edziĝo, morto, okazontaj gravaj esp. kunvenoj festoj k. s.) se n-page. Aliaj anoncoj, nur akceptataj por minimume du sinsekvaj enpresoj, kostas po du enpresoj kaj 20 vortoj (krom unu adresoj) la prezo de ok ET-numeroj kontraŭ antaŭa pago. Abonantoj, ĉe kiuj ni povas depreni la pagon de la abonkonto, ĝuas per propra anoncoj preferan prezon de kvin ET-numeroj. Germanoj pagas 2—mk., prefera prezo por poŝtabonantoj 1,25 mk. Anoncetoj devas alveni 12 tagojn antaŭ publikigo.

EDZIĜO. F-lino Božena Vesela el Jaromer (Ĉeĥoslovakio) kun s-o Ivo Onyŝenko el Kijov (Ukrainio).

Korespondo kaj Interŝango.

Du junaj studentoj, ĉe Mara Teknika Akademio, deziras interkorespondi esperante, france kaj bulgare per il. pk. kaj l. kun gesamideanoj de la tuta mondo pri teknikaj kaj elektroteknika aferoj; popolaj moroj kaj kutimoj; literaturo kaj teatro; interŝanĝos il. revuon. Adreso: N. Najdenov kaj Iv. Bakargiev, Str. Vajniska n-o 5, Varna, Bulgario.

S-o Ludoviko Obrezián, Mezökövesd, Hungarujo, interŝanĝas il. pk. (bfl.). Nia popolomodo estas mondama. Pm. po 50-100, ankaŭ seriojn, portretojn, gazetojn kpl. Ne sendas unue, sed certe respondos.

S-o A. Faasse, Tamarindestr. 29, Utrecht, Nederlando, deziras korespondi per interesaj vidindaĵoj (prefere naturbildoj). Respondos akurate kaj petas legeblaj adresojn.

F-lino Jadwiga Machnicka (polino), Poznań, Br. Zagórze 10, Polujo, deziras korespondi kun la tuta mondo per il. pk. kun interŝango de fotografaĵoj. Korespondas ankaŭ pole kaj germane.

F-lino Gertruda Leszek, Poznań, Mostowa str. 5a, Polujo, deziras korespondi kun la tuta mondo per il. pk. Korespondas pole kaj germane.

Mi deziras korespondi kun la tuta mondo per il. pk. F-lino Gertruda Kubiakówna, str. Długa 7, Poznań, Polujo

10 diversaj germanaj miliardo-provizoroj, uzitaj kontraŭ antaŭa sendo de 0,40 d-laro aŭ poŝtmarkoj de via lando laŭ sama valoro. Mi ne sendas unue, Hermann Albrecht, Köln, Am Zuckerberg 8, Germ. (Rekom. de la redakcio).

S-o Yrjö Rundberg, Heikka Vuorikatu 1, Viipuri, Finlando, deziras korespondi per il. pk. kaj l. kun la tuta mondo.

S-o Augusto Kiss, arĥitekturo, Rákospalota, Ťrház u. 19, Hung., deziras interŝanĝi pm. kun tutmondo, certe respondas. Mi vendas por 3 sv. k. 150 diversajn nedifektajn pm.

F-lino Erna Tietze, Annenstr. 28, Merseburg (Saale), Germ., deziras korespondadi per l. kaj il. pk., ankaŭ interŝanĝas pm. Respondos ĉiam.

F-lino Frida Kunth, Gotthardstr. 30, Merseburg (Saale), Germ., deziras korespondadi per il. pk. kun ĉiuj landoj.

F-lino Marie Schmidt, Unteraltenburg 10, Merseburg (Saale), Germ., deziras interŝanĝi il. pk. kun ĉiuj landoj.

S-o Otto Klapper, Luisenstr. 10, Merseburg (Saale), Germ., deziras korespondadi per il. pk. kaj interŝango de pm.

S-o Karl Lohmann, Hallesche Str. 7, Merseburg (Saale), Germ., deziras korespondadi per il. pk. kaj l. kun ĉiuj landoj.

S-o Hermann Schmidt, Unteraltenburg 10, Merseburg (Saale), Germ., deziras korespondadi per il. pk. kaj l. kun ĉiuj landoj. Interŝanĝas il. pk. pri tipoj kaj naciaj kostumoj, ankaŭ pm. kaj fotografaĵojn.

S-o Arrigo Tonino, Via Asilo M. Volpe 45, Udine, Italujo, korespondas per il. pk. kaj l. kun la tuta mondo il. pk. pm., papercaron, moneretojn, fotografaĵojn (kostumojn), revuon, ĵurnalojn kaj librojn en Esperanto. Korespondas ankaŭ en franca lingvo.

Mi deziras interŝanĝi pm. kaj papercaron kun ĉiuj landoj. Adreso: Stanislaw Dzius, Staro Zagnanska 55, 1. Kielce, Polujo.

Kelkaj anoj de la Heldera Societo Esperantista deziras korespondi per il. pk. kaj l., kaj interŝanĝi ekspoziciematerialon (gazetojn naciajn kaj esperantajn, fotojn de gesamideanoj ktp.) La societo garantias respondon. Adresu al la sekretario de la Heldera Societo Esperantista Nova Sento, Doolhof 5, Helder (N-H), Nederl.

EDZIĜO. Okazis en Krakov edziĝo de s-o Leopold Goldberger, dentkuracisto, kun f-lino Giza Monderer. Alnovedziĝintoj — vigla kasisto kaj ĉarma membrino — kore gratulas Krakova Esp. Societo.

S-o Erich Sackwitz, Karlstr. 11, p. Merseburg (Saale), Germ., deziras korespondadi per l. il. pk. kun ĉiuj landoj pri interesaj temoj. Interŝanĝas helpemonon.